

Kataluna Esperantisto



NUMERO 340 (106)
KVINA EPOKO
OKTOBRO-DECEMBRO
2006

33a Kataluna Kongreso

Gastronomia renkontiĝo

**Buda kaj prelega
maratono**

Adiaŭ al Badlands

**Esperanto en amas-
komunikiloj**

**Indymedia Barcelono,
du jaroj en esperanto**

**Novjare en Pollando
kaj Germanio**

La legantoj

William Auld


L'osset

El repte del plurilingüisme a la Polinèsia (francesa)

En el número 339 de la revista *Kataluna Esperantisto* aparegué una breu notícia titulada “Crispació colonialista a la Polinèsia” en relació a la publicació per membres l’Acadèmia Tahitiana de la llengua (*Fare Vāna’a*, en tahitià) i d’altres intel·lectuals d’una carta oberta pel plurilingüisme a la Polinèsia el 7 de juliol del 2006. En aquesta carta, els signants denunciaven la resolució del Consell d’Estat de la República Francesa d’abolir l’article 15 del reglament de l’Assemblea Territorial de la Polinèsia (francesa) que permetia les intervencions a la cambra en tahitià. La carta oberta culpa d’aquesta derogació l’article segon de la constitució francesa, que entronitza el francès a tota la República, incloent-hi les dependències colonials. Amb tot, el *Fare Vāna’a* omet un punt molt important de l’argumentació emprada pel Consell d’Estat l’abolició de l’article del reglament susdit, i és l’article 57 de la Llei orgànica, de 27 de febrer de 2004,

per la qual es constitueix l’autonomia i autogovern del *pays d’outremer* que és la Polinèsia (francesa). En aquest article ja s’estableix la preeminència del francès sobre totes les llengües de la dependència polinèsia:

“Le français est la langue officielle de la Polynésie française. Son usage s’impose aux personnes morales de droit public et aux personnes de droit privé dans l’exercice d’une mission de service public ainsi qu’aux usagers dans leurs relations avec les administrations et services publics. La langue tahitienne est un élément fondamental de l’identité culturelle: ciment de cohésion sociale, moyen de communication quotidien, elle est reconnue et doit être préservée, de même que les autres langues polynésiennes, aux côtés de la langue de la République, afin de garantir la diversité culturelle qui fait la richesse de la Polynésie française.”

Continua a la pàgina 15 

Cinc arxipèlags, set llengües polinèsies, un poder autònom tahitià, un invasor imperialista francès i la seva llengua colonial. Qui acabarà perdent la batalla per la supervivència?





SJOERD BOSGA

ADN: “Ne perdu tempon kaj lernu la anglan”

Ni bilancu kaj adaptiĝu

Finiĝas la jaro kaj alvenas la tempo bilanci, ne nur pro la proksimiĝo de la jara asembleo, sed pro la neceso kompreni, kie ni bone aŭ mise investis niajn fortojn kaj kio estas plej farinda estonten.

Unu aspekto estas sufiĉe nova ĉe ni: en septembro ni ricevis tri klarajn negativajn artikolojn: en *ADN*, en *Diari de Terrassa* kaj en *ABC*. En *ABC* evidente pro afero ne rekte rilata al esperanto... tamen sufiĉe en rilato, por ke la estraro de KEA decidu subskribi polemikan manifeston kaj ekriske engaĝiĝon en la politikan arenon kaj akiron de konateco. En *Diari de Terrassa* temas pri rekta atako al la moderneco de esperanto, kaj *ADN* pli malkaŝe esprimas la ideon: “ne perdu tempon kaj lernu la anglan” klare komprenigas la direktoron de la senpaga ĵurnalo. Temas pri tute senprecedencaj publikaj sintenoj en nia lando, ĉar esperanto ĉiam ĝuis sim-

pation en Katalunio: oni ja eble taksas la aferon romantika kaj nerealigebla, sed kontraŭo apenaŭ ekzistis.

Krome, alia esenca aspekto aperas, se oni atente legas la novaĵojn: multas aktivaĵoj kaj agantoj ĝojinde diversas. Tamen... mankas veraj respondeculoj pri fakoj. Nuntempe en nia socio homoj pli kaj pli malemas surprizi respondecojn, des malpli longedaŭrajn. Kiam plilarĝiĝanta segmento de la popolo pretas fordoni parton de sia salajro por mallongigi sian laborhoraron, tempo fariĝas esenca valorajo kaj eble tial oni ja pretas helpi en difinitaj okazoj, sed prefere ne longedaŭre engaĝiĝi. Eble estiĝos interesa kontraŭdiro: membroj volontule laboretos sub la gvido de profesiuloj, kiujn ili pagos por funkciigi la asocion. La mondo ja ŝanĝiĝas: ni konsciu kaj adaptiĝu.

Hektor Alos i Font

En ĉi tiu numero kunlaboris: Abel Martínez, Andi Münchow, Borja Vilallonga, Carlos Hernández, Cesc Castellet, Christian Pinard, Darío Rodríguez, Elisabeth Laika, Éric Collignon, Esperanto Conflent, Ferriol Macip, Gerard Escuer, Joan Inglada, Josep Enric Peres i Blesa, Juvenal Puig, Karles Berga, KIS-TV, Llibert Puig, Núria Coll, Przemysław Grzybowski, Ramon Perera, Sjoerd Bosga, Sylvie Roques, Xavi Batlle, Xosé Conde.

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Katalunio/Katalunio
Tel. 937 109 636; Faksno: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2006: Individua Abonanta Membro 38 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 76 eŭroj; Individua Dumviva Membro 760 eŭroj; Kolektiva Membro 76 eŭroj; Juna Membro 25 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053
Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Gemma Armadans, Mateu Vic, Ramon Perera.

Kontrolo Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Óscar Puig.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV.
Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Estraro: Prezidanto: Lluís Batlle; vicprezidanto: Pau Climent; sekretario: Joan Català; kasisto: Roger Prieto.

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

33a Kataluna Kongreso de Esperanto

Kataluna Esperanto-Asocio elektis Amposta, la ĉi-jaran ĉefurbon de la kataluna kulturo, por okazigi sian 33an nacian kongreson, la 8an, 9an kaj 10an de decembro 2006. Krome, por la unua fojo, eksperimente, estis organizita ankaŭ turisma antaŭkongreso, en kiu tri familioj ĝuis la belegan kaj variajn pejzaĝojn de la Delto de Ebro, sed ankaŭ helpis starigi esperantobudon en la regione grava foiro de Amposta okazinta dum la semajno de la kongreso.

La riĉa programo, kun entute 31 eroj, turnis ĉirkaŭ interkulturo per plej diversaj formoj: per matena praktikado de la ĉina gimnastiko ĉikongo, per prezento pri okcitanlingva libro pri ukraina revolucio, per prelegoj pri la islamaj katalunoj aŭ pri la lingva kaj kultura diverseco en Nepalo, per ateliero pri interkulturo, per kunveno de *Monato*-abonantoj, per koncertoj de Jomo kaj Kaj Tiel Plu... Entute 15 prelegantoj, i.a. Stefan Maul, Przemek Grzybowski kaj Mukunda Pathik, kaj du altiraj koncertoj allogis 134 aliĝintojn, inkluzive de 23 alilandaj esperantistoj el 9 diversaj landoj. Kiel kutime en la katalunaj esperanto-kongresoj, parto de la programo estis nacilingva por interesigi nesesperantistojn, sed la temaro ne nepre rekte rilatis al esperanto: ekz. tiukadre, la renoma socilingvisto Jordi Solé Camardons nacilingve prelegis pri la multlingveco en la katalunaj lernejoj.



SJOERD BOSGA

Aparte menciindas la sukcesa informado pri la kongreso. Cent kvindek montrofenestroj de la dudekmil-loĝanta Amposta estis kovritaj per kongres-afiŝoj, dum du metrojn altaj afiŝejoj tra la urbo informis pri la programo. La loka radio regule dissendis reklamon, kun muziko de Jomo kaj Kaj Tiel Plu, en kiu oni invitis partopreni la koncertojn kaj la nacilingvajn programerojn. Reeĥe al la varbado, okazis kortuŝa anekdoto: la vizito de ŝafisto kun lia edzino, kiu venis vidi la kongreson post la enstaligo de la bestaro kaj ĝuis la etoson per infana miro. Naci-skale, aperis entute 15 gazetaj informoj pri la kongreso (inkluzive de *El Periódico*, *Avui*, *El Punt*, *Diari de Girona*, *Diari de Tarragona* kaj *Vilaweb*).

Entute la kongreso montriĝis tre sukcesa kaj la elekto de la ĉefurbo de la kataluna kulturo – tre trafa pro la granda helpo de la magistrato de Amposta al la kongreso. □



SJOERD BOSGA



PRZEMYSŁAW GRZYBOWSKI



SJOERD BOSGA

Ekskursa kaj gastronomia renkontiĝo



ESPERANTO CONFLENT

La grupo Esperanto Conflent organizis, kun la helpo de KEA, sian kutiman aŭtunan renkontiĝon. Post la mezepoka kastelo de Vilafranca de Conflent de pasinta jaro, nia aro de geamikoj retrovis sin ĉi-foje en la montara gastejo de Vallmanya la semajnfino de la 30a de septembro kaj 1a de oktobro.

La vilaĝo de Vallmanya situas meze de la valo de Lentilla, tiu valego kondukanta ĝis la altebenaĵo de Cortalets, piede de l'monto Canigó. Kvankam la vojo por tien iri ne staras inter la plej facilaj, la loko estas belega pro la proksimeco de la unuaj pintoj de Pireneoj, pro la sovaĝeco de ties arbaroj, pro la pureco de la belvidejo.

La unua posttagmezo, nia grupo piediris al la malnova fer-minejo de La Pinoso. Krom la malfacilecon de la laboro de niaj antaŭuloj en tiuj subteraj galerioj, tiuj lokoj rememoras al ni ankaŭ la kruelecon de la Dua Mondmilito. Ĉi tie okazis la batalo de la nazioj kontraŭ la francaj kaj la hispanaj makisanoj de la grupo Henri Barbusse; memortabulo montras la lokon, kie la nazioj pafmortigis Julien Panchot. Dum la reveno al la gastejo ni ĝuis aŭtunan marŝadon, sub kelkaj pigremaj nuboj, aŭdante la sonorilojn kaj la blekojn de la ŝafaroj reirantaj la ŝafejon.

Grandega momento de kuir-arto atendis nin ĉe la tablo: niaj gastingantinoj, s-ino Mary kaj ties filino, preparis dum la tuta

tagmezo nekredoblan "civet de singlar" (apran sangosaŭcaĵon), kun kuiritaj piroj kaj frambokonfitaĵo, akompanitan de "gratin dauphinois" (terpomoj kuiritaj kun kremo kaj fromaĝo)... Ŝi mem ĉasis la apron kelkajn tagojn antaŭe kaj eĉ la vegetaranoj forgesis dum kelkaj horoj siajn kutimojn por ĝui tiun regalon (vere)!

Ni devis denove gratuli niajn ĉefkuiristinojn pro la tre agrabla matenmanĝo, kie la francaj buterbulkaj ludis sur la tablo kun la rostitaj panoj meze de la kruĉetoj de lakto, de kafo kaj de oranĝosuko. Matenaj sunradioj briligis la tasegojn kaj ni ĝuis tre dolĉan vekiĝon, ja bezonatan post la frenezaj kantadoj de la nokto... La Trinca trinkigas: ĉu vi sciis pri tio?!

La dimanĉa mateno daŭriĝis per promenado ĝis la fermbienoj de Los Masos, dum babilado pri manĝeblaj fungoj, pri esperanta gramatiko kaj pri arto de la instruado. La suno milde varmigis nin, kiam ni revenis al la gastejo, kie Ferriol kaj Christian kantigis nin per la muzikoj de la violonoj, kaj tiu ĝuinda vetero ebligis la dimanĉan manĝadon sur la teraso. Alia miraklo de tiu kataluna kuirarto, "boles de picolat" (buletoj el viando kun saŭco el fungoj kaj olivoj), ĝojigis nin denove. Post la kafo kaj la likvoroj, venis la tempo de l'adiaŭoj, kaj ĉi foje ni forlasis malĝoje ne nur nian amikan rondon, sed ankaŭ niajn gastingantinojn.

La anoj de la loka grupo de Prada parolas nun kun la okuloj plenaj de rememoroj pri tiu gastronomia renkontiĝo, jam planante iun privatan dimanĉan tagmanĝon ĉirkaŭ apraĵo... ĉiam por la sukceso de esperanto, evidente!

Christian Pinard

Kaŝtanfesto en Vallgorguina

Post multaj jaroj da interrompo, Centro de Esperanto Sabadell denove organizis kaŝtanfeston, ĉi-foje en Vallgorguina, en malnova bieno meze de la natura parko de Montnegre i el Corredor. Pli ol 20 personoj el ĉiuj generacioj respondis al la alvoko kaj povis ĝui la laŭkutime familian kaj trankvilan etoson de tiaj renkontiĝoj. Nia grupeto



disponis la tutan domon, kio ege faciligis liberajn aktivaĵojn de ĉiuj. Noktemuloj noktemis trinkante kaj klaĉante ĝis la ektagiĝo. Frumatenumuloj frumatenumis, lanĉis sin arbaren kaj revenis kun interesa kolekto de fungoj. Ĉiuj aprezis la riĉan kaj abundan manĝon de la domo kaj la afablecon de la posedantoj. Vi venu venontjare!

éc

Lasta Zamenhof-festo en Badlands

Vendredon la 15an de decembro okazis lasta Zam-festo en Badlands. Ne estis multe da homoj, eble tial ke estis tago, en kiu oni faras multe da familiaj kaj entreprenaj vespermanĝoj. Ĉi tio ne estis maloportunaĵo, sed ĝuste inverse, ĉar ĝi permesis la kuniĝon de malgranda grupo de samideanoj, kiu parolis amike pri la internacia lingvo kaj la lingva imperiismo en nia lando, ĉiam akompane de bona biero kaj muziko.

cc

Manĝ-feste en Sabadell

La pasintan 17an decembro okazis en Sabadell, kiel ĉiujare, tagmanĝa kunveno por festi la Zamenhofan tagon. Centro de Esperanto Sabadell organizis la aranĝon en simpatia restoracio, kiu nomiĝas Marko Polo, ĉar en ĝi oni proponas orientan kaj mediteranean manĝaĵojn. Partoprenis 27 homoj el Sabadell, el Ripollet kaj el Barcelono. Ĉio pasis bonege, en amuza amika etoso, kaj ĉiuj povis gustumi bonajn ekzotikajn pladojn.

nc



ABEL MARTINEZ

Kurso en Cardedeu

Novaj kursoj

Kiel ĉiujare, esperanto-kursoj rekomenciĝis en aŭtuno. Ĉi-foje, laŭ nia scio, estas kursoj en Barcelono, Cardedeu, Prada de Conflent, Premià de Mar, Sabadell kaj Vilanova i la Geltrú. La listo kun datoj, horoj, niveloj kaj adresoj estas afiŝita en la TTT-ejo de KEA.

Tago de la asocioj en Prada

Okazis la 9an de septembro 2006 en Prada de Conflent la unua "Tago de la asocioj" organizita de la urbestro. Sabato estas en Prada ankaŭ la tago de la semajna loka foireto kaj, pro tio kaj pro la agrabla vetero, la sukceso ĉeestis.

Deĵoris preskaŭ la tuta grupo Esperanto-Conflent por prezenti la asocion kaj ties kur-

La esperantistoj starigis budon en Prada de Conflent

Adiaŭ al Badlands

En januaro fermiĝos la barcelona muzik-trinkejo Badlands, estrita de la esperantistoj Pako Belmonte kaj Belem Prado. Badlands dum longa tempo funkciis kiel semajna renkontiĝejo de junaj esperantistoj kaj en ĝi okazis pluraj Zamenhof-festoj kun bonaj biero kaj muziko en plaĉa, trankvila, gastama ejo. Ĝi malaperos muelita de la spekulado per nemoveblaĵoj kaj la sieĝado de la novaj posedantoj por forpeli la malnovajn luprenantojn, kiuj en 1992 starigis sian trinkejon kaj de tiam ĉiel klopodis igi ĝin pli komforta kaj akceptema. Barcelono perdis amindan ejon, la katalunaj esperantistoj – referencon... kaj du homojn – sian pandonan laboron. Profitos nur spekulaciistoj, kiuj venkis danke al ĉiel favora leĝaro. Kiu estos la sekva?



ESPERANTO CONFLENT



FM

sojn, la lingvon kaj ties avantaĝojn. Krom kun la kutimaj vizitantoj komprenantaj, la bezonon de internacia lingvo neŭtrala ĉar “la angla jam sufiĉas” –eĉ se ili ne scias unu vorton de ĝi–, interesajn kontaktojn havis nia areto ankaŭ kun personoj, kiuj jam aŭdis pri esperanto aŭ jam pensis pri la problemo de la egaleco de la lingvoj. Tio montras, ke eĉ se niaj pasintaj agadoj, artikoloj au prelegoj ne tuj fruktodonis, la grenoj tiam semitaj nun leviĝas.

Evidente, kiel ĉiun jaron, ni atendas nun por vidi, ĉu la promesoj iĝas realo kaj ĉu el la deko da personoj reale interesitaj por lerni la lingvon venos almenaŭ kelkaj. Fakte, eĉ en nia urbeto kun malpli ol 6000 loĝantoj, ekzistas nun pli ol 40 asocioj, ĉiu ŝajne pli alloga ol la aliaj. Tiu kreskado de la nombro de asocioj malfaciligas nian taskon: konvinkinte pri la intereso lerni nian lingvon, ni devas nun trovi la taŭgan horon por ĝin instrui meze de la lavango de la aliaj okupproponoj...

Tiam, pli ol la raciaj argumentoj, pli savas nin la amika etoso de nia grupo kaj la bela rideto de ties anoj!

Esperanto Conflent

Budo en Barcelono

La 11an de septembro, okaze de la 5a Asoci-Foiro de la Kataluna Landaro en Barcelono, ankaŭ esperantistoj ĉeestis en la socia kaj asocia montrofenestro de la lando. Libroj,

Deĵorantoj en la budo de Barcelono la 11an de septembro



FERRIOL MACIP

KDoj, T-ĉemizoj de KEJ kaj la DVD de E@I estis disvenditaj. Rimarkeblas, ke ĉi-foje ne estis tiom da demandoj, pri kio estas esperanto; ŝajne la publiko jam sufiĉe bone konas nian aferon. La kontaktoj estis do por informiĝi pri kursoj kaj agado, kaj multaj petis de ni traduki iliajn retpaĝarojn.

fm

Buda kaj prelega maratono

La agado de la asocio daŭre restis turnita eksteren en la lastaj monatoj. Nur kelkajn tagojn post la starigo de la budo en Barcelono, Ferriol Macip prelegis pri esperanto en Cardedeu la 17an de septembro. La prelego celis varbi por okazonta kurso de esperanto kaj estis organizita de la loka anaro de la Studenta Sindikata de la Kataluna Landaro, kiu tre bone diskonigis la aranĝon en la urbo. La 21an de oktobro KEA ĉeestis en la inaŭguro de la biblioteko Pau Bossoms en la popola ateneo L’Arboç en Arbúcies kaj donacis ekzempleron de la libro de Francesc Poblet *Els inicis del moviment esperantista a Catalunya* (antaŭvidita asoci-foiro estis lastmomente malpermesita de la loka magistrato kaj la planita budo de KEA ne estis star-igita). La 18an de novembro KEA denove surstratiĝis per budo okaze de la Duaj Liberecanaj Kultur-tagoj de Premià de Mar, organizitaj de la loka sindikato CNT. La sekvan tagon Ferriol Macip prelegis en la sama aranĝo pri la historio de la esperantomovado. Plian budon starigis KEA de la 5a ĝis la 10a de decembro en la foiro de Amposta, nia kongresurbo, kaj la 16an kaj 17an de decembro Kataluna Esperanta Fervojist-Asocio partoprenis en la asoci-foiro de L’Hospitalet de Llobregat. Entute en la lastaj kvar monatoj de la jaro estiĝis budoj en kvin malsamaj urboj kaj du publikaj prelegoj.

Aliĝo al manifestoj

En septembro KEA aliĝis al la manifesto lanĉita de Coordinadora d’Associacions per la Llengua, Plataforma per la Llengua kaj CIEMEN kun la titolo “A l’ajuntament de Barcelona: que el Pregó de la Mercè sigui en català!”, celinta, ke la festparolado de la ĉeffesto de Barcelono okazu en la kataluna. Novembre, KEA aliĝis al alia manifesto por la daŭrigo de la katalunlingvaj elsendoj en la publika hispana televido. Ĉi-okaze la

iniciato estis de la laboristoj de la koncerna televido en Katalunio. La aliĝo de KEA al la unua agado havis reeĥon en la ĵurnaloj *El Mundo* kaj *ABC*, kiuj aktive kontraŭis la manifeston. *ABC* menciis KEA inter la “pitoreskaj societoj subskribintaj kontraŭ la festparolado”.

Radie en Barberà

Pasintan 26an de septembro ĉe *Ràdio Barberà del Vallès* oni intervjuis dum almenaŭ tri kvaronhoroj nian aktivulon Llibert Puig. La temo estis la aktuala situacio de esperanto en Katalunio kaj la mondo, kaj la prezidanto de Centro de Esperanto Sabadell prezentis trarigardon de la evoluo de la movado kaj elstarigis la katalunan partoprenon en la UK kaj IJK. Krome li anoncis la venontan katalunan kongreson en Amposta kaj la kursojn komenciĝontaj en novembro en Sabadell.

lp

Esperanto en la amaskomunikiloj

Esperanto aperis konsiderinde multe en niaj amaskomunikiloj en la lastaj kvar monatoj de la jaro: ĝi duobligis la nombron de novaĵoj de la antaŭaj ok monatoj. La apero de KIS-TV meritis la atenton de *Vilaweb* la 6an de septembro, de *Presència* la 15an kaj de *Barcelona TV* la 23an. Ankaŭ la esperanta retejo farbskatol.net estis rimarkita de la reta gazeto *Vilaweb Tecnologia* la 6an de septembro.

La 5an de septembro la senpaga ĵurnalo *ADN* aperigis artikolon pri simpligita angla lingvaĵo, en kiu en aparta tekstoskatolo oni prezentis volapukon kaj esperanton. Al ĝi reagis la aktivulo Martí Guerrero en letero aperinta tri tagojn poste. La letero estis reliefigita kaj meritis apudan opinion de la gazet-direktoro, en kiu tiu ĉi malrekomendis esperanton.

Negativaj aludoj pri esperanto fariĝis pli multaj en tiuj tagoj per la artikoloj de dekstrismaj *ABC* kaj *El Mundo* kontraŭ la sinteno de KEA en la lingva polemiko pri la festparolado en Barcelono. Sed ankaŭ la 26an de septembro aperis tutpaĝa artikolo en *Diari de Terrassa* pri kurso de esperanto en Sant Cugat del Vallès, en kiu la subtitolo

estis “loka grupo ankoraŭ proponas klasojn pri esperanto”.

Tamen tute pozitiva estis la priesperanta artikolo aperinta en *L'Indépendant* la 6an de novembro. Siavice, Llibert Puig estis intervjuita en tri malsamaj radioj: en *Ràdio Barberà* la 26an de septembro, en *Ràdio Sabadell* la 7an de novembro kaj en la gazeto *Sabadell Més* la 15an de novembro.

La kongreso de Amposta meritis notojn en la agendoj de la gazetoj *El Punt*, *Avui*, *Diari de Tarragona* kaj novaĵojn en la ĵurnaloj *El Punt* (du tagojn), *El Periódico* kaj *Diari de Girona*; la ret-gazetoj *Vilaweb*, *Tinet Digital*, *Yahoo News*, *Hispavista Noticias*; kaj la novaĵ-agentejo *Europa Press*.

Laste, *El Punt* de la 20a de decembro mencias esperanton ankaŭ en recenzo de la libro *En el repòs de la trinxera* de Frederic Pujulà i Vallès.

Entute la jaro fermiĝas kun 47 novaĵoj kaj mencioj pri esperanto: pli ol la 33 de 2005, sed multe malantaŭ la rekordo de 119 de la jubilea jaro 2004.

Du novaj filmetoj en KIS-TV

Post la apero de recenzo pri KIS-TV en pluraj katalunaj gazetoj, la teamo de KIS-TV plibonigis la retejon kaj alŝutis du novajn info-kisojn.

En “JoMo slavumas” la fama okcitana kantisto JoMo parolas pri sia muzika kariero kaj prezentas sian lastan diskon. JoMo (Joan-Marc Leclercq) estas okcitana kantisto. Antaŭ longe li estis la kantisto de Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj), kiu eldonis du KD-ojn per la franca diskeldonejo Boucherie et Willins Production, kies urĝa enscenigo leviĝis al ekstreme varmaj koncertoj tra tuta Eŭropo, el kiuj pli ol la duono okazis en Francio. La jaron 1996 formiĝis la bando JoMo kaj Liberecanoj, kiu kunigas punkan, rokan kaj skaan muzikon. La repertuaro de JoMo estas 22-lingva, inter kiuj troviĝas esperanto. Sia lasta albumo estas “Jomo slavumas”, ĵus eldonita. Sole JoMo proponas al ni longan muzikan spektaklon kun energia kaj festa muziko kun ritmoj foje rokabilaj sed ankaŭ tradiciaj sla-



Novaĵo pri KIS-TV en Presència



JoMo dum la 33a Kataluna Kongreso de Esperanto

S. PUIG BOSA



Kiki Vidotto dum la 33a Kataluna Kongreso de Esperanto

vaj en esperanto, en la okcitana kaj en ĝis 22 lingvoj.

En “Lingvo de l’ geavoj, lingvo de l’ genepoj” Christine Vidotto kaj Joan-Marc Leclercq rakontas al ni sian surrealistan sperton pri sia familia lingvo. La lingva politiko en la Franca Respubliko hontigis i.a. la plejmulton de la okcitanoj pri ilia gepatra lingvo kaj sukcesis, ke multaj gepatroj rezignis transdoni la familian lingvon al sia gefiloj. Tiu fakto kreis tutan generacion da okcitanidaj franclingvanoj. Kelkaj el ili, kiel Joan-Marc kaj Christine, malgraŭ ĉio, lernis la geavan lingvon.

Ĝuu KIS-TV ĉe www.esperanto.cat/kistv.

kis-tv

Nova eldono de la KEA-lernolibro

Ĉi-oktobre, kun la komenco de la kursoj, publikiĝis nova eldono de la KEA-lernoli-

bro. Pedro Martín entreprenis plibonigon, enkondukante bildetojn en ĉiuj paĝoj kaj finan alfabetan indekson laŭteman. Krome la nova versio aldonas tekstojn iam verkitajn de aktivula skipeto kiel kultur-komplementoj de la lastaj lecionoj kaj kiuj plej taŭgas ĝuste interne de la lernolibro. Entute, plaĉa renovigo de elprovita lernolibro.

KE en lernu!

La populara retejo *lernu!* aperigis paĝon kun informoj pri nia revuo en sia biblioteko. Per tio *Kataluna Esperantisto* fariĝas unu el la 12 revuoj, pri kiuj ĝis nun esperanto-lernantoj povas legi, kiel pri *Kontakto*, *La Ondo de Esperanto*, *Juna Amiko* aŭ *El Popola Ĉinio*.

La kataluna en Ĉuvaŝio

Carlos Hernández partoprenis la 11an Lingvan Festivalon en Ŝupaŝkar (Ĉuvaŝio), okazintan la 20an, 21an kaj 22an de oktobro

Indymedia Barcelono en esperanto, dujara

La esperanto-eldono de la alternativa sendependa novaĵejo Indymedia Barcelono fariĝis dujara. Ĝi estis aprobita la 9an de septembro 2004 de la asembleo de Indymedia Barcelono kaj, post du monatoj kaj duono da streĉa laboro, ĝi estis lanĉita la sekvan 25an de novembro kaj fariĝis unu el la ĉefaj inform-projektoj de KEA por diskonigi kaj normaligi la uzon de esperanto en la lokaj neesperantistaj medioj.

Indymedia estas granda reto prizorgata de grupoj en la tuta mondo kaj organizata per retlistoj kaj asembleoj. La projekto Indymedia naskiĝis okaze de la manifestacioj kontraŭ la kunveno de la Monda Organizaĵo pri Komerco en Seatlo en 1999. La informcentro tie aranĝita funkciis kiel renkontiĝejo, kie ĵurnalistoj povis trovi informojn kaj/aŭ publikigi siajn proprajn. Unu jaron poste, en kunveno en la okupita domo Espai Obert (Malfermita Loko) en Barcelono oni decidis krei Indymedia Barcelono, danke al la laboroj de aliaj Indymedia-centroj kaj al volontula laboro. Ĝi fariĝis la unua centro funkcia en Eŭropo. De tiam Indymedia Barcelona kreskis ĝis ĝi fariĝis tio, kio ĝi nun estas: libera kaj kolektiva loko permesanta la sinesprimon de individuoj, socialaj movadoj kaj ĉiaj organizoj sen eblecoj aliri la amaskomunikilojn. Sur tiu bazo, la asembleo de Indymedia Barcelona decidis en septembro 2004 prezenti esperanton kiel novan lingvan eblecon por legi la ĉefartikolojn. Per esperanto ĝi “celas kontribui al pli justa mondo, en kiu neniu, pro naskiĝo aŭ ekonomia nivelo, havu pli da eblecoj scipovi la superregantajn lingvojn; t.e., ĝi celas eviti diskriminacion pro lingvaj kialoj”. Per tio esperanto prezentiĝas samnivele apud la kataluna, la hispana kaj la angla.

Du aliaj Indymedia-eldonejoj estas havas esperanto-eldonojn: la brazilan, kiu pioniris, kaj, en multe malpli alta grado, la poste aperintan belorusan.

Dum tiuj dujara laboro estis regule tradukitaj ĉiuj ĉefartikoloj – entute pli ol 200 – fare de plurkapa skipo, en kiu nuntempe aktivas ĉefe Joan Català, Josep Maria Milla kaj Miquel Gómez. Temas pri postulema tasko, ne nur ĉar traduki malfacilas, kaj pli de la propra nacia lingvo al esperanto ol inverse, sed ankaŭ ĉar la sociala enhavo, ne kutima en esperanto-medioj, postulis la evoluigon de specifa terminaro, kunmetatan de la kunlaborantoj mem. Danke al ĝi, kaj al la formika laboro de la laboroteamo, ĉ. 500 terminoj, kiaj “kontraŭtumulta policano”, “seksa sieĝo en la laborejo” aŭ “kaserol-protesto” fariĝis kutimaj por la regulaj legantoj de Indymedia Barcelono.

kaj organizitan de la Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko. Nia samasocio prezentis la lingvojn katalunan kaj hispanan en la jara ĉef-agado de la ĉuvaŝiaj esperantistoj. La Lingvaj Festivaloj estas bone konataj tut-urbaj aranĝoj ĉiujaraj, jam tradiciaj, kun centoj da partoprenantoj, en kiuj oni intensive prezentas plurdekon da lingvoj en la rusa, la ĉefa lingvo de la ĉefurbo de Ĉuvaŝio. Per ĝi la lokaj esperantistoj montras sian sentemon al la lingva diverseco... krom en sia lando, ĉar la ĉuvaŝa estas neglektita kiel pera lingvo de la araĝo, same kiel ĝi forestas en la TTT-ejo de la asocio (www.esperanto.cheb.ru). Tamen la festivalo tre sukcese diskonigas esperanton en la urbo kaj ĉiujare kreas novajn lingvanojn, tiel ke Ŝupaŝkar estas unu el la urboj de la mondo kun plej multe da esperantistoj, kiuj nur esceptokaze superas 30 jarojn.



CARLOS HERNANDEZ

Carlos Hernández
en multlingva festivalo

Komerco per esperanto

Josep Franquesa partoprenis la Azian PTC-Foiron, pri hidraŭliko kaj pneŭmiko, okazintan de la 10a kaj 13a de oktobro en Ŝanhajo. Helpis en tradukoj tri ĉinaj esperantistoj: Wang Minhao, el Ŝanhajo; Wang Tiengi, el Xian; kaj Hu Chu, el Wuhan. La prezidanto de KEA povis subskribi interkonsentojn por sia firmao kaj importi konteneron da materialoj.

Novjare en Pollando

Kortuŝita jam revenis el Ago-Semajno la kataluna teamo. Kvin partoprenantoj aliĝis laŭ lando Katalunio: Sjoerd Bosga, Chiara Fortunato, Xosé Conde, Jordi Aromí kaj Xavi Batlle. Ĉi tiu renkontiĝo, jam tradicia, okazis ekde la 26a de decembro ĝis la 2a de januaro en la urbo Nowy Sącz, sude de Pollando. Kvankam malvarmis ekstere, katalunoj, kiel kutime, tre kontribuis varmigi la etoson per ties kantoj kaj gajeco. Kune kaj amike, oni ekskursis, ludis tablotenison, trankvile parolis en la gufujo trinkante teon, dancis kaj festis la novan jaron 2007.


xb

Tre interesa kaj internacia renkontiĝo estis Ago-Semajno: vera malmultekosta alternativo al IS. Multis rusoj kaj ukrainoj. Ĉiutage io interesa okazis: kantoj de ukrainianoj, nacia vespero kun folkaj polaj dancoj de

Nowy Sącz kaj gustumado de regionaj produktoj, interesa ekskurso en la regiono, dua interesa ekskurso al Sary Sącz kun popola muzikgrupo kaj tipa tagmanĝo... Kaj kompreneble, celebrado de la alveno de la nova jaro ekde la 22a horo (kun rusoj) kaj ĉiuhore poste: ŝaumvinon (preskaŭ netrinkeblan), bondezirojn, brakumojn, kisojn... kaj sama viruso por ĉiuj venontage! La du katalunoj, la galego (mi), tri polinoj, unu belgo kaj unu francino manĝis por la unua fojo 12 vinberojn laŭ nia plej tipa tradicio. Kaj ili estis tiom seriozaj kaj senrida, ke eĉ post 15 sekundoj de la nova jaro ili neniam povis diri aŭ fari dum ĉiuj jam brakumis unu la alian kaj bruis.

xc

Novjare en Pollando



SJOERD BOSGA



Novjare en Germanio

... aŭ en Germanio!

Ĉi-jare okazis la 50a Internacia Seminario en la kastelo Wewelsburg, apud Paderborn. Entute venis 209 homoj (plena- aŭ partatempaj), inter ili estis ses katalunoj kaj mi, eksbellaterrano. Fakte kvin el ili partoprenis la unuan fojon kaj tre ĝuis la diversan programon tage kaj nokte. Kelkaj pintaj momentoj estis la 1a Internacia Kulinara Festivalo (kie katalunoj furoris per la alportitaj specoj da ŝinko, tomatpano ktp), la koncertoj (ekzemple JoMo kaj la nova franca hiphop-grupo Pafklik) kaj la internacia vespero, kiu enhavis multegajn kontribuojn de la partoprenantoj.

il

TTT-ejo de la tago

La retloko de la eldonejo O Limaco Edizioni, www.limacoedizioni.com, estis elektita la 23an de oktobro kiel la "TTT-ejo de la tago"

fare de la retgazeto lamalla.net. O Limaco, gvidita de nia samasocio Ferran Marín, eldonas papere aŭ elektronike en ĉiuj iberiaj lingvoj –kun speciala atento al la aragona– kaj ankaŭ en esperanto. Inter ĝiaj lasta eldonaĵoj elstaras la fabelaro *Filandón*, en la astur-leona lingvo.

Lingve: Azenoj en beletro

Ni parolu pri metaforoj. Ni donu ekzemplon klasikan en la okcident-eŭropa literaturo: la dentoj de l'amatino estas kiel perloj.

Kiam temas pri tutmonda lingvo, natura demando estas: Ĉu metaforoj havas universalan valoron? Verŝajne ne. Almenaŭ ne ĉiuj. Ni vidu, kio povas okazi, se temas pri azenoj.

Azenoj estas traktataj figuracese en diversaj literaturoj, sed la valoro atribuita al ili varias depende de la kultura fono.

En la fama romano de la brito George Orwell *Animal Farm* (Besto-bieno), azeno kondukas malbonhumore kaj cinike. Mi tradukas:

"Post la ĉevaloj envenis Murielo, la blanka kaprino, kaj Benjameno, la azeno. Benjameno estis la plej maljuna besto en la bieno, kaj la plej malbonhumora. Li malofte parolis kaj, kiam li tion faris, tio

estis por ion cinike rimarki (...) Nur li inter la bienbestoj neniam ridis."

Tute alia estas la vidpunkto de la nobelpremiita hispana poeto Juan Ramón Jiménez en lia proza poemaro *Platero kaj mi* (Platero, arĝentulo, estas hispana vorto por nomi blankajn azenojn). Tie la azeno utilas por montri intimajn pensojn kaj lirikajn sentojn. Mi tradukas:

"Arĝentulo estas malgranda, har-abunda, glateca; tiel supra ekstere, kvazaŭ tuta el kotono, senosta. (...) Li estas tenera kaj kares-ama same kiel infano, kiel infano...; sed interne fortika kaj seka kvazaŭ el ŝtono."

En nia originala literaturo, la eminenta Jean Ribillard utiligis la azenon M' Saud (araba nomo, kiu signifas 'feliĉa') por esprimi la ironion kaj solidan kulturon de la aŭtoro kaj la saĝon kaj la humuron de la araba popolo. Post vivo plenplena de aventuroj –plej ofte malfeliĉaj– kaj ne

malproksime de la morto, M' Saud bilancas:

"Mi ja agnoskas, ke mi estas nur malnova azenaĉo, kiu urĝe bezonas riparon, sed kiu tamen meritus pli da estimo pro longedaŭra servuto."

Kaj malgraŭ ĉio, en lia vivo okazis iuj feliĉaj momentoj:

"Ho! tiuj karotoj, karmezinaj, molaj, sukeraj, kies dolĉa suko gutadis el mia festa buŝo, kiujn mi longe maĉadis kaj frandis ĝis krakrompo de mia subventra rimeno! Ili donis al mi tiun brilrufan hararon, tiun fajran rigardon, tiun altfieran mienon, kiuj senprudentigis tiom da junaj azeninoj."

Evidente, en la cititaj ekzemploj, azenoj rolas ne en simplaj metaforoj, sed en alegorioj kaj kompleksaj situacioj. Juĝu mem!

Ramon Perera

William Auld (1924 - 2006)

William Auld va morir el dia 11 de setembre de 2006 a la seva casa d'Escòcia. Es tracta de qui és unànimement considerat el més important dels poetes contemporanis en aquest idioma internacional, i va ser candidat al premi Nobel en 1999.

Auld, escocès, havia nascut el 6 de novembre de 1924, i era professor de literatura. Va aprendre l'idioma esperanto el 1937, amb 13 anys, i va començar a escriure literatura una dècada després. En 1952 va aparèixer el llibre *Kvaropo* (Quartet), amb poemes seus i d'altres tres escriptors escocesos en esperanto. *Kvaropo* és una obra referencial per a la història de la literatura en esperanto: no només és l'obra primerenca d'Auld, sinó que també va donar a llum l'anomenada Escola Escocesa, que va agrupar alguns dels millors poetes dels anys posteriors a la II Guerra Mundial, i va prendre així el relleu de l'Escola Hongaresa –noucentista– que va dominar el període d'entreguerres. El llibre, a més, va suposar a la vegada el naixement de l'editorial Stafeto, la més prestigiosa de la literatura en esperanto durant els anys cinquanta i seixanta del segle passat.

Entre els llibres originals d'Auld destaca especialment *La infana raso* (La raça infantil), llarg cicle poètic en dotze parts, que ha estat traduït i editat també en anglès, holan-

dès, portuguès i hongarès. Per a molts no es tracta només de la millor obra del seu autor, sinó també la més important de la literatura en esperanto.

Auld és també autor de nombrosos poemes i relats, publicats en llibres individuals i antologies. Per la seva obra original va ser candidat en diverses ocasions al premi Nobel, per primera en vegada en 1999, cosa que va ser destacada per nombrosos mitjans culturals, ja que era la primera vegada que era candidat un escriptor en una llengua planificada.

És de destacar també la seva labor traductora d'obres en anglès a l'esperanto. Entre les obres traduïdes podem citar nombroses traduccions de la poesia en llengua anglesa, majoritàriament recollits en l'Antologia Anglesa (en dos extensos volums) i l'Antologia Escocesa, però també diversos drames de Shakespeare i tots els seus sonets, així com obres d'Oscar Wilde, Jack London, Arthur Conan Doyle, i, la seva última obra, la traducció completa d'*El senyor dels anells*, de Tolkien. Va traduir també d'altres llengües, com *Aniara*, del suec Harry Martinson –en col·laboració amb Bertil Nilsson– i els *Rubaiat* d'Omar Khayyam.

Auld va destacar també per la seva activitat en el moviment esperantista. Va ser vicepresident de l'Associació Mundial d'Esperanto, president de l'Acadèmia d'Esperanto i pre-



William Auld, considerat el més important dels poetes contemporanis en esperanto, va morir el dia 11 de setembre de 2006 a la seva casa d'Escòcia.

Les obres de William Auld van presentar per primera vegada en la literatura esperantista la possibilitat de concebre l'ésser humà modern com essencialment aspirant a altíssimes fites i assolint, justament per aquest desig, una solitud sense precedents. Auld va mostrar amb imatges inspiradíssimes que en aquella solitud, nascuda de l'intel·lecte, hom sent amb agudesia la temptació de rendir-se davant d'algun santuari de fe, religió o doctrinari.

En Auld, tal capitulació contradiu tota la base intel·lectual i moral de la vida de l'home modern. Es demana de quina manera aquell qui aspira als astres i accepta el fet de la negror de l'espai que l'envolta, pot racionalment i diàriament reconstruir aquelles bases de la solidaritat humana que buscàvem en les religions i les creences seculares.

Aquesta constant autointerrogació seva, potser més clarament descomposta en *Unufingraj melodioj* (Melodies a un dit), condueix la clàssica renarració de la història de la humanitat en la *La infana raso* (La raça infantil), les melodies

multidigitals de *Humoroj* (Humors), les moltíssimes participacions en les aventures culturals de la humanitat amb abundant obra crítica i traduïda, i manta cosa més per a una simple llista.

La intervenció d'Auld va redissenar completament el nostre sostre, de tal manera que cap escriptor posterior en esperanto no ha pogut deixar de viure sota el seu teulat. Com si amb això no n'hi hagués prou, ens va donar una brillant antologia, una crestomatia, un llibre de text, llibres d'estudi superiors.

Ara, quan ja no el tenim personalment entre nosaltres, comencem a entendre per què a absolutament ningú en la comunitat esperantista no li ha vingut al cap que algú altre a part d'ell podria ser el nostre candidat al premi Nobel de literatura.

Probal Dasgupta

